

Inter la partoprenantoj en tiu debato estis ia mal-konsento. Iuj opiniis ke ekzistis jam sufiĉe da asocioj kaj tamen malmulte da informado pri la Esp-Movado en tiaj asocioj. Ĉiukaze, la afero ne prosperis. Rigardata la afero ekde la perspektivo de la tempo pasinta de tiam, oni povas konkludi ke eble ne estis bone difinitaj aŭ tute ne ekzistis la komunaj celoj kiuj povus doni sencon al tiel ampleksa organizaĵo aŭ kunaĵo de E-grupoj apartenantaj al malsamaj landoj kaj kun la sola komuna trajto ke ĉiuj ili situas ĉe la Eŭropa bordo de la Atlantika Oceano.

La gekongresanoj estis poste akceptitaj de la urbestro de Avilés. En tiu protokola akto, Nicolás Muñiz profitis por donaci, por la koncerna kultura fako, la librojn kiujn li gajnis en la televida konkurso, kiujn la Urbestro akceptis kaj dankis. Post interparolado kun la urbestro kaj kun la ĵurnalistoj la gekongresanoj estis invititaj trinki aperitivon kun almanĝetoj en famkonata urba restoracio, kaj la Urbestro promesis nomi Esperanto unu el la stratoj de la urbo. Vespere S-ino Rafaela Urueña prelegis, hispane pri “Esperanto kaj internaciaj rilatoj”. Sekvintan tagon la gekongresanoj kune kun amaso da neesperantista publiko spektis artan kantadon far de la **Ĥoro de la Asturia Centro**.

Pri tiuj aktoj kaj aliaj pli malpli protokolaj kaj kutimaj en la kongresoj de Esperanto pli detale informas la menciita 65a numero de la revuo **HELECO**. Ĉi tie ni preferas atenti pri la kongresaj rezolucioj, kiuj estis jenaj:

1. **Peti de la Hispana Registaro, ke okaze de ĝia Prezidenteco en la Komuna Eŭropa Merkato, Hispanio proponu Esperanton kiel helplingvon por la rilatoj inter la landoj de tiu Komunumo.**
2. **Proponi Esperanton kiel parto de la lecionaro en la Baza Ĝenerala Instruado.**
3. **Aprobante la proponon de la Grupo “ANTAŬEN” por ke oni aljuĝu la Premion de la Konkordo “Princo de Asturio” al Esperanto, insisti per petskriboj al**

**diversaj urbestroj por ke ili, siavice, esprimu sian apogon al tiu ĉi peto.**

4. **Krei oportunan komisionon por iniciati la efektivigon de la propono pri ADLOE (Amikoj de la Orienta Atlantiko).**

5. **Sendi leterojn al la Moŝtoj Federico Mayor Zaragoza kaj Fernando Morán, al ili komunikante la rezoluciojn de la Kongreso.**

En iu akto de tiu kongreso en Avilés, la Prezidanto de **Astura Esperanta Asocio**, Santiago Mulas, anoncis ke la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** okazos la senvan jaron en Gijón. La sama numero 65a de **HELECO** kiu informis pri la kongreso de Avilés inkludis jam alvokon al la gesamideanoj de nia urbo por partopreni en la organiz-laboro de tiu forumo.

La Universala E-Kongreso de tiu jaro okazis en Brajtono (Britio). El nia urbo partoprenis en ĝi Julio Argüelles, kaj iris ankaŭ kelkaj gesamideanoj el Avilés, kun sia Prezidanto Nicolás. Pri tiu vojaĝo amplekse raportis Julio en la 86a numero de **HELECO**. La esperantista festo aŭ Zamenhofa Tago de la jaro 1989 sekvis saman skemon ol la antaŭaj jaroj. Kunvenis en Gijón geesperantistoj el tiu-ĉi urbo kaj el Avilés, kaj post la ofero de florbukedoj en la strato Esperanto, la kunfestantoj partoprenis bankedon

en iu restoracio. Tie, antaŭ la bankedo estis disertacio, preskaŭ prelego, de iu franca samideano, Jean Françoise Bouyge, el Clermont Ferrand. Li estis juna studento kiu, por studi kaj praktiki la hispanan lingvon, ĉeestis kurson en nia urbo. Li raportis pri la Esperanto-grupo de lia franca urbo.

La 7an de februaro 1990 okazis ĝenerala kunveno de la membraro de **Astura Esperanta Asocio** por pritemi la tiaman ĉefan taskon de tiu E-rondo: la organizadon de la **Tria Astura Kongreso de Esperanto** en nia urbo. Oni prezentis la provizoran programon ellaboritan de la Organiza Komitato kaj oni kontrolis la staton de la organizado de ĉiuj planitaj programeroj.



**En la Dua Astura Kongreso de Esperanto (Avilés, 1989)**